# INFORMA PAKO
# Roskilde 2023 kun Esperanto-Teamo

**KARA ALIĜINTO AŬ KANDIDATO!**

Dankon, ke vi volas travivi kun ni la mojosan sperton de Roskilde Festivalo!

Por sukcese partopreni en nia teamo, certiĝu, ke vi trairis ĉiujn paŝojn el la suba listo.

Se ĉio klaras kaj ni jam respondis al viaj demandoj, gratulon! Vi ne devas fari ion ajn kroman, simple antendu sekvajn novaĵojn. ;)

Se viaj planoj ankoraŭ dumtempe iel ajn ŝanĝiĝus, ne hezitu kontakti nin.

**Listo de farendaĵoj**

1. Pripensi, ĉu vi estos disponebla por la partepreno, plani feriojn. Konsilon pri gravaj datoj vi trovos sube.
2. Plenigi la aliĝilon (se vi ankoraŭ ne faris). Por aliĝintoj ĝis la fino de aprilo atendos senpaga t-ĉemizo de nia teamo! La aliaj povos aĉeti ĝin surloke.
3. ~~Pagi la deponmonon de 30 EUR (ĝiru prefere per Paypal al roskildefestivalo@gmail.com).~~
   Ni decidis ĉi-jare tamen rezigni pri la deponmono por faciligi la aliĝadon. Tiuj, kiuj jam pagis (dankon, ni scias, ke ni povas kalkuli je vi!), rehavos la monon en la venontaj tagoj.
4. Krei konton kaj ensaluti en nia teamo “DEJO - Esperantoholdet” en People-vol. – la oficiala datumbazo por volontuloj.
5. En via profilo ĉe People-vol. mendi tranoktadon en la volontula tendaro (se vi volas) per alklako de „order volunteer camping”. Ĝi estas senpaga (krom la kazo ke vi tamen ne venos sen antaŭe malmendi).
6. Kontroli la koncertan planon – ĝi estas jam preta.
7. Elekti deĵorojn – sekvu tiun ĉi gvidilon: W Elekto de deĵoroj paŝo post paŝo 2023.docx
8. Kontroli la provizoran programon (tiu ĉi estas kreita surbaze de RF 2022)
   En la dosiero ĉiuj rajtas libere aldoni siajn rimarkojn en la kolumno „O” (alvenhoro, koncertaj deziroj, ktp.).
9. Inviti viajn amikojn al Roskilde.
10. Resti mojosa! :D

**Gravaj datoj**
20.06 – ekde tiu tago eblas veni por helpi pri starigado de la tendaro kaj bazejo – helpo bonvena ☺
24.06 – la festivalo oficiale komenciĝas kaj malfermiĝas por la publiko; iomete da preparlaboro
25-27.06 – „malgrandaj” koncertoj kaj aktivaĵoj
27.06 – instruado pri kiel deĵori – DEVIGA PARTOPRENO*
28.06-02.07 matene – tagoj grandaj koncertoj = niaj labortagoj – DEVIGA PARTOPRENO 3 x 8 h*
2.07-04.07 – forpakado de la tendaro kaj bazejo – helpo bonvena ☺

* se vi, pro ia ajn kialo, ne povos plene partopreni en devigaj partoj, sciigu nin kaj ni diksutos pri solvo

La etan esperanto-kurson ni faros ĉiutage (laŭ  intereso) ekde la 24-a de junio ĉirkaŭ 10-12 ĝis la komenco de la laboro. Pli da detaloj estos en la dosiero Programo.

**Biletoj por volontuloj = brakbendoj**
Mallonge antaŭ la festivalo via bileto aperos en via profilo ĉe People-vol. Pli da informoj poste.

**Telegramo**

Dum la festivalo, sed ankaŭ nun, ni uzas tiun ĉi Telegraman babilejon.